Rudolf Alexander Schröder,

An die Nelke

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Rudolf Alexander Schröder *(∗1878-01-26 – †1962-08-22).*

Arg-781-1564 (2013-01-19 14:03:15)

Pri la poeto vidu la vikipedian retejon `http://de.wikipedia.org/wiki/Rudolf_Alexander_Schr%C3%B6der`.

Rudolf Alexander Schröder,

Al la dianto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ho dianto, rozfratin',
vi stel-cirklo ronda, vere
firme kaj eĉ pli fiere
vi ja scias fermi vin.

Vian koron montras vi;
sed du flamoj ruliĝantaj,
konvulsie langumantaj
arde brulas super ĝi.

Spic-odoron, fajron vi
portas kvazaŭ el-infere,
tamen ŝvebas en-aere[2]
kiel flirta papili'.

Floras, kara amikin',
ĉiam ĉe l' fenestro bele,
akompanas vi fidele
tra la tuta jaro min.

Traduko de la Germana poemo "An die Nelke" de Rudolf Alexander Schröder *(∗1878-01-26 – †1962-08-22) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-781-1565 (2013-01-19 13:52:21)

[2] aŭ:
tamen ŝvebas vi leĝere
kiel bela papili'.